

BULGARA ESPERANTISTO

Organo de Bulgara esperantista asocio

Rekomendita de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 1870 de 27. I. 1922.

Jarabono: 20 bulgaraj levoj, 1 svisa franko, 4 respondkuponoj aŭ egalvaloro.

Anonctarifo: 1 kv. cm. — 1 levon;

korespondo: 1 vorto — 1 levon. Por fremdlando — duoble. Postĉekkonto No 1133

Adreso: str. P. VI. Alabin, 50. SOFIA, Bulgario.

Jaro XVIII

Septembro-Oktobro 1936

1-2



Kongresanoj antaŭ la kongresejo en Tirnovo.

Raporto pri nia XXIII-a kongreso en Tirnovo

(19.—20. de julio 1936. j.)

Je la 10:30 h. dimanĉe — 19. de julio, en la salono de „Moderen teatr“, okazis solena malfermo de la kongreso. La salono estis pompe dekorita per standardoj de ĉiuj ŝtatoj. Partoprenis multaj geurbanoj, delegitoj kaj gastoj-esperantistoj.

Reprezentanto de mitropolito Sofronij pastro Stojkov kune kun pastro B. Angelkov, esperantisto de v. Buĉin-prohod-Sofia regiono, faris diservon en esperanto kaj benis la kongreson en la nomo de la sankta eklezio. Per belaj vortoj pastro

Stojkov salutis la kongreson kaj bondeziris fruktodonan laboron.

La kongreson malfermis per konvena kaj bela parolado s-ano Zlatev, prezidanto de la loka kongresa komitato. Li proponis la jenan kongresestraron: prezidantollija Silvestriev el Ŝumen, vicprezidantoj d-ro Pan. Hitrov el Tirnovo kaj Iv. Krestanov el Sofia, sekretarioj — Georgi Hr. Dimov el Varna kaj Georgi Donĉev el Tirnovo.

La kongresprezidanto Il. Silvestriev

*Ĉu ti min forgesas
Korajn salutajn al ĉiuj niaj familianoj
Gid. Georg*

Paroloj de la prezidanto

Duan fojon mi havas la okazon ekstarti sur la fruntlokon de la bulgara esperanto — movado kiel prezidanto de la Bulgara esperantista asocio.

La unuan fojon — en 1927. — post la eksterordinara kongreso en Sofio kaj post la ĝin sekvinta XIV. kongreso en Plovdiv, mi gvidis centran komitaton, kiu havis la tre malfacilan taskon likvidi grandajn monŝuldojn, forigi suspektemon de la aŭtoritatoj, regajni la bonan opinion de la bulgara socio pri Esperanto.

Tiam ni sentis, ke nin sekvas senrezerve granda parto de la bulgara esperantistaro, unuanima, voloplana. Ni kolektis tiam, dank' al la samideana oferemo, kelkajn dekojn da miloj de levoj kaj sukcesis antaŭ ĉio kovri grandan parton de la ŝuldoj de l' Asocio. Per nia kritiko al la kontraŭesperanta cirkulero de la tiama ministro de la popola instruado ni pensigis kaj paroligis multajn intelektulojn pri Esperanto. La eldonita de la Asocio broŝuro havis du eldonojn kaj estis rapide elĉerpita. La ĵurnalaro ekparolis pri nia movado.

Nun denove mi ekkaptis la direktilon de la Asocio, laŭ la deziro kaj konfido de la centra komitato.

donis sinsekve la parolon al la oficialaj kaj societaj reprezentantoj.

Unua parolis reprezentanto de la loka militĉefo s-ro majoro Sarafov. Poste parolis: la urbesto s-ro T. Fârtunov, s-ro rez. generalo Daskalov — de la rezervaj oficiroj, s-ano H. Bâĉvarov de la lokaj gimnazioj; s-ano B. Oktomvrijski tralegis la leteron de la prezidanto de Bulgara esperantista asocio — P. Jordanov, kiu petis pardonon, ke pro grava privata laboro ne povis viziti la kongreson; s-ro Iv. Ĉantov—de la societo „Stara stolica“; s-ano B. Milĉev — de Bulgara vegetara asocio; s-ano N. Piperov — de la loka abstinenca societo; la filineto de nia s-ano Radoslav Triĉkov el Vraca—Esperantina — salutis je la nomo de la infanoj parolantaj esperanton kaj fine s-ano Iv. Krestanov—de la fremdlandaj esperantistoj, kiujn li vizitis dum sia vojaĝo tra Eŭropo. La sama proponis, ke ni petu la urbeston, kiu partoprenas la kongreson,

Denove mi sentas la grandajn taskojn, kiuj staras antaŭ ni, kaj mian respondecon antaŭ la bulgara esperanto-movado.

Mi trovas ĉirkaŭ mi kolegojn — membrojn de la centra komitato — homoj inteligentaj, kleraj kaj kun decida deziro labori por Esperanto. Tio ĉi donas al mi kuraĝon kaj fidon. Mi sentas, ke denove aperas homoj, kiel en la pasinteco, kiuj povas relevi Esperanton al tiuj altaĵoj, kiujn ĝi estis atinginta antaŭ pli ol dek jaroj.

Sed tio nur ne sufiĉas. Mi atendas eksenti la apogon de la tuta bulgara esperantistaro. Oni ne devas lasi la entuziasman kelkon en la centro de la movado streĉi superhome siajn fortojn, eluzi sian energion kaj fine vidi sin forlasita, izolita, nesekvata.

Ankoraŭ unu fortostreĉon, gesamideanoj! En la pasinteco vi faris oferojn, vi kreis sukcesojn. Ne restu nun indifereantaj en la aŭroro de la nova ekleviĝo de Esperanto en Bulgarujo.

Novaj kaj malnovaj esperantistoj, donu frate viajn manojn, por ke ni ekiru denove de triumfo al triumfo!

At. D. Atanasov — Ada.

unu el la stratoj en Tirnovo nomi „D-ro L. Zamenhof“. La urbestro respondis, ke li pristudos tiun ĉi demandon.

La prezidanto dankis al ĉiuj por la belaj paroloj.

Telegrame estis salutitaj la reĝo kaj la ministro-prezidanto, kiuj bonvolis respondi ankaŭ per telegramoj.

Sekvis legado de saluttelegramoj kaj leteroj de diversaj esperantistaj asocioj eksterlandaj kaj de: Sofia, Plovdiv, Varna, Ruse, Gabrovo, Elena, Pazarĝik, Elhovo, Batak, Kacelovo k. a.

DUA TAGO

Je la 9 h. komenciĝis la kunsido en la salono de la komerca gimnazio sub la prezido de s-ano Il. Silvestriev, kiu tralegis la jenan tagordon:

1. Elekto de diversaj komisionoj.
2. Raportoj de la centra kaj kontrola komitatoj.

3. Liberigo de la estraro de respondeco.
4. Estonta agado kaj diversaĵoj.
5. Elekto de nova centra komitato.

La tagordo estis sensange akceptita.

La komisiono por la kontrolo de la rajtigiloj de la delegitoj en konsisto: Ivan Kovačev — Ruse, Boris Golemanov — Sofia kaj Mara Saralieva — Varna, anoncis la jenan rezulton:

De la centra komitato — B. T. Oktomvrijski kaj St. Gančev; de la kolekta grupo — K. Dermengieva el v. Kilifarevo, Il. Jamukov el v. Bojanovo, Rad. Tričkov el Vraca. M. Metev el v. Nova mahla, Bor. Milčev el v. Kneja kaj Bor. Angelkov el v. Bučin prohod; Sofia — Iv. Krestanov, P. Mitkov, Bor. Golemanov, Mar. Nikolov kaj Tr. Spasova; Varna — G. Dimov. Ĥr. Cvetkov kaj M. Saralieva; Ruse — Iv. Kovačev; Pazarĝik — Iv. Konstantinov; Tirnovo — d-ro P. Hitrov kaj G. Dončev; Ŝumen — Il. Silvestriev kaj J. Jankov; Sevlievo — At. Nikolov.

La asocia sekretario Belčo T. Oktomvrijski tralegis la raporton pri la agado de la centra komitato de B. E. A. dum 1935—1936 jaro. La raporto estis sufiĉe kaj detale elĉerpita kaj faris bonan impreson.

La kreskon de la membroj de B. E. A. la sekretario prezentis per la jena tabelo:

| Societoj | Loko | 1932 1933 | 1933 1934 | 1934 1935 | 1935 1936 |
|--------------------|------------------|--------------|--------------|--------------|--------------|
| Kolekta grupo | — | 17 | 27 | 47 | 59 |
| Esp. societo | Sofia | 21 | 31 | 35 | 46 |
| „Albatro“ | Varna | 10 | 16 | 24 | 27 |
| „Solidareco“ | Ruse | 22 | 31 | 31 | 20 |
| „Radio“ | Pazarĝik | 16 | 7 | 15 | 19 |
| „Lumo“ | Tirnovo | 10 | 15 | 20 | 19 |
| „Vekiĝo“ | Ŝumen | — | 5 | 12 | 16 |
| „Kulturo“ | Plovdiv | 12 | 10 | 15 | 13 |
| „Fratiga stelo“ | Sevlievo | — | 6 | — | 7 |
| „Toleremeco“ | Jambol | — | 10 | 3 | 5 |
| „Rila verda stelo“ | Dupnica | 7 | 8 | 9 | 4 |
| „L. L. Zamenhof“ | Orehovo | 10 | 17 | 12 | 4 |
| „Espero“ | Ruse | — | 26 | 34 | 3 |
| „Stelo“ | Kârĝali | — | — | 6 | 1 |
| „Espero“ | v. Stijerov | — | — | — | 1 |
| „Sukceso“ | Vraca | 12 | 10 | 8 | — |
| „Espero“ | G. Orenovica | — | 8 | 6 | — |
| Esp. societo | Lom | 10 | 10 | — | — |
| „Verdstelano“ | St. Zagora | 10 | 10 | — | — |
| „Radio“ | Samokov | 5 | 1 | — | — |
| „Nigra maro“ | Burgas | 20 | — | — | — |
| „Mondlingvo“ | st. G. Orehovica | 5 | — | — | — |
| Entute | | 187 | 248 | 277 | 244 |

La sekretario esprimis dankon al la estraroj de la menciitaj societoj por kunhelpo kaj por plimultigo de siaj membroj: Sofia, Varna, Pazarĝik, Ŝumen, Sevlievo kaj Jambol.

La sama konkludis, ke la amaso de la bulgara esperantistaro ne aliĝis al la asocio kaj ne donis sian subtenon al la centra komitato por ĝia, vere, malfacila laboro.

Post tio s-ano St. Gančev-prezidanto de la kontrola komitato — tralegis la raporton de la k. k. kaj konstatis, ke ĉiuj aferoj de la centra komitato estas en plena ordo kaj ĉiuj elspezoj regule faritaj kun la necesaj dokumentoj.

Georgi Dimov—Varna: Konstatis, ke „Bulgara esperantisto“ havas plibonigon, sed ne aperas regule. Riproĉis centran komitaton, ke ĝi ne sendis dum la jaro la cirkulerojn ĝustatempe kaj petis estonte ke la cirkuleroj estu aparte sendotaj.

P. Mitkov—Sofia: Riproĉis la centran komitaton, ke la kunvenojn de la centra komitato portoprenis nur 4—5 membroj kaj ke ĝi (centra komitato) ne estis sufiĉe agema.

Bor. Golemanov — Sofia: Konstatis, ke malgraŭ la malbonaj kondiĉoj de agado, la centra komitato faris ĉion eblan kaj la asocia jaro finis per kultura akiro.

Rad. Tričkov—Vraca: Aprobis la agadon de la centra komitato kaj riproĉis la esperantistojn, kiuj nesufiĉe kunhelpis la centran komitaton.

La prezidanto voĉdonigis la raportojn de la centra kaj kontrola komitatoj, kiuj estis liberigitaj de la respondeco kun aplaŭdoj.

En la proponado, sugestiado kaj diskutado pri estonta agado partoprenis s-anoj: Iv. Krestanov, St. Daniskov, Iv. Stanev, Il. Silvestriev, d-ro P. Hitrov, Iv. Konstantinov, G. Dimov, B. Oktomvrijski, R. Tričkov kaj B. Milčev.

LA POSTTAGMEZA KUNSIDO

estis malfermita je la 16 h.

La komisiono pri la budĝeto en konsisto: P. Mitkov, J. Jankov kaj At. Nikolov proponis projekton de budĝeto por la venonta jaro.

Post la debatoj oni akceptis la jenan budĝeton:

E n s p e z o :

| | | |
|-------------------------|------------|---------------|
| 1. Membrokotizo | levoj | 8,000 |
| 2. Abono | „ | 14,400 |
| 3. Vendo de varoj | „ | 100 |
| 4. Membrokotizo por UEA | „ | 700 |
| 5. Diversaj | „ | 2,000 |
| | Sume levoj | <u>25,200</u> |

E l s p e z o :

| | | |
|----------------------------|------------|---------------|
| 1. „Bulgara esperantisto“ | levoj | 10,000 |
| 2. Ekspedo de „Bulg. esp.“ | „ | 1,300 |
| 3. Poŝtelspezoj | „ | 1,300 |
| 4. Kancelariaj | „ | 2,000 |
| 5. Kotizo al UEA | „ | 700 |
| 6. Salajroj | „ | 6,000 |
| 7. Propagando | „ | 3,500 |
| 8. Diversaj | „ | 400 |
| | Sume levoj | <u>25,200</u> |

S-ano At. Nikolov invitis, je la nomo de la societo, la XXIV-an kongreson en

Sevlievo. Ankaŭ s-ano Iv. Konstantinov invitis la venontan kongreson en Pazarĝik. Oni akceptis kun aplaŭdoj la duan inviton.

Pri la XXX-a universala esperanto kongreso parolis la s-anoj Ŝiŝkov kaj Silvestriev. Fine la kongreso decidis, ke oni invitu la XXX-an en Sofia.

Laŭ la propono de B. Golemanov el Sofia, la kongreso decidis, ke oni salutu la kongreson por paco en Ĝenevo.

La prezidanto sciigis la kongresanojn, ke pro urĝa privata laboro li devas tuj forveturi. Lian lokon okupis s-ano Ivan Krestanov.

La elektita komisiono por rezolucioj en konsisto: d-ro P. Hitrov, Iv. Krestanov, G. Dimov, G. Donĉev kaj Iv. Konstantinov proponis la jenan rezolucion, kiu estis unuanime akceptita:

„La XXIII-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj, kiu okazis je la 19. kaj 20. de julio 1936. en Tirnovo:

1. Atentigante la neŭtralecon de la mondhelpe lingvo esperanto, proklamita ankoraŭ en la I-a universala esperanto-kongreso en Boulogne-sur-Mer, Francio de la aŭtoro de esperanto d-ro L. L. Zamenhof;

2. Konsiderante, ke la bulgaraj esperantistoj ĉiam helpis per kultura agado sian patrolandon, celis kaj celos kunhelpi per esperanto la konigon de la proksimaj kaj malproksimaj popoloj kun nia lando kaj popolo kaj krei rilatojn de amikeco;

3. Konsiderante, ke por la eduko kaj la praktiko de la juna generacio mankas pli efika kaj grava rimedo ol la internacia helplingvo esperanto;

D E C I D I S :

1. Klopodi ĉe la oficialaj faktoroj en la lando subteni la enkondukon de esperanto en la lernejoj, kaj ĉe ĉiuj organizaĵoj (de bankoficistoj, de kooperativistoj, de telegraf-poŝtistoj k. a.), malfermi laŭ propra iniciato kursojn por siaj membroj;

2. Peti s-ron ministron prezidanton, la registaron kaj la urbestron de Sofia, ke ili akceptu inviti kaj subteni XXX-an internacian esperanto-kongreson en 1938, kiu okazu en Sofia; samtempe la kongreso deklaras, je la nomo de ĉiuj bulgaraj esperantistoj, ke ili ĉiuj donos sian kunhelpon por ĝia sukcesplena okazigo, vidante la grandan utilon de ĝi por Bulgario kaj la bulgara popolo;

3. La venonta XXIV-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj okazu en Pazarĝik, laŭeble jam printempe (dum Pentekosto); La centra komitato faru sian eblon, ke la kongresanoj ricevu 75% rabaton sur la fervojoj, ke oni invitu kiel gastojn samideanojn el fremdlando;

4. La presorgano „Bulgara esperantisto“ aperadu regule almenaŭ dumonate kun plibonigota enhavo;

5. La estonta centra komitato danku ĉiujn personojn kaj organizaĵojn, kiuj salutis la XXIII-an kongreson de la bulgaroj esperantistoj kaj ankaŭ radio-stacion de Sofia kaj radio-stacion de Varna pro ilia favoro al esperanto;

6. Fondi specialan preseksion ĉe la asocio, kiu zorgu pri la propagando per la bulgara gazetararo la ideon pri internacia helplingvo, kaj per la esperantogazetararo — Bulgarian, samtempe subtenante ankaŭ „Bulgara esperantisto“-n;

7. Alvoki ĉiujn malnovajn kaj novajn samideanojn pliintensigi sian agadon por la esperanto-propagando kaj ankaŭ zorgi pri la regula membrado al la asocio de ĉiuj esperantistoj“.

Albatro

Al Esp. societo „Albatro“ en Varna.

Tra ŝtormoj sin levas arĝenta flugil',
la forta flugil' de l' Albatro —
impulsas la bruston fiera trankvil'
kaj ĝoj' tra mallumo verdatra —
antaŭen, antaŭen tra densa nebul'
post kiu lazurojn ekvidas okul'!

Albatron renkontas ŝaŭmanta kaos'
ĝin ondoj minacas engluti,
sed ĝi ne ektimas, sen halt' sen ripoz'
sin portas al suno salute —
antaŭen, antaŭen tra densa nebul',
post kiu lazurojn ekvidas okul'!

Kun fido al sia potenc', sen hezit',
ebría de stranga inspiro,
ĝi venkas malhelpojn per firma spirít',
ĝin gvidas eterna sopiro —
antaŭen, antaŭen tra densa nebul'
post kiu lazurojn ekvidas okul'!

Varna, 16.VIII.1936.

M i t i

Estis elektita balotkomisiono: Rad. Tričkov, pastro Bor. Angelkov kaj J. Jankov. La elekto okazis per sekreta voĉdono kaj estis elektitaj la jenaj personoj:

Centraj komitatanoj — Atanas D. Atanasov, d-ro Zahari Zaharijev, Petr Jordanov, Ljuben Marikin, Ivan Vâlčanov, Belčo Tod. Oktomvrijski kaj Stefan Kiragiev; rezervaj — Stojan Minčkov kaj Stefan Jončev.

Kontrolaj komitatanoj — Stefan Gančev, Kiril Georgiev kaj Ivan Iliev; rezerva — Georgi Gaševski.

La prezidanto komunikis la supran rezulton kaj fermis la kongreson.

*

*

Nun, junaj samideanoj, kuraĝe antaŭen! Vi, malnovaj pioniroj, revekiĝu! Ni ĉiuj kune levu pli alten la verdan standardon — simbolo de la espero! Ni unuigu niajn fortojn, ĉar nun estas postulata unueco de la agoj por sukceso de nia sankta afero! Tiel unuigitaj „ĝis revido en Pazarĝik!“.

Raportis sekretario de BEA:
B. T. Oktomvrijski

Letero

Per la unua freŝa printempa sunradio
ĝojigan korsaluton al vi mi volis sendi,
kaj, kiel foje — kun kamarada bondeziro,
por varma premo manon al via man' etendi.

Dezirís mi, ke ree ni estu geamikoj —
fidemaj, sampensantaj kaj kun komuna senti',
ke en ĉeesto via distriĝu la konfliktoj,
sennombre mín ŝirantaj en ĉiu viv-moment'..

Sed estas plu neeble — la vintro metís baron
inter ni — du animoj revintaj sen esper'.
Haltigas mín dolore la vigla rememoro
pri la aŭtuna, muta, sen ĝoj' disiĝvesper'...

En la dezerta strato ni marŝís tute solaj,
per míl brilantaj steloj observís la ĉiel',
kaj post nebul' maldensa tremetís luno pala,
nin kaŝe rigardante, ridante kun kruel'.

Kial ni ne konfesis sinceraniman senton?
Kial ni ne malfermis la koron je sindon?
Kial vortet' karesa ne rompís la silenton?
Kial ni ne kuraĝís? Ĉu estís ni el ŝton'?

... Per la unua freŝa printempa sunradio
ĝojigan korsaluton al vi mi volis sendi,
kaj kiel foje — kun kamarada bondeziro
por varma premo manon al via man' etendi.

Varna, 1936.

K a i n T e r a

Esperanta insuleto

Kiam mi alproksimiĝas al Kotel, mi multe ekĝojas.

Ne nur pri la beleco de ĝia ĉirkaŭaĵo, de la bluj arbarozaj montaroj, malproksimaj, fieraj, silentemaj.

Ne nur pri la bela, abunda, pitoreska, bolanta, natura fontano, en kies kristale klaraj akvoj respegulas sin koketaj somerumantinoj.

Ne nur pri la simpatiaj kotelanoj, sin laŭdantaj pri sia glora pasinteco kaj dolore plendantaj pri sia mizera estanteco.

Ne nur pri ĉio tio!

Mi ŝatas Kotel ankaŭ pri ĝia simpatia, koketa, malgranda, nevidebla esperanta insuleto.

En la maro de la ordinaraj interesoj, streĉado al facilaj supraĵaj travivaĵoj de la somerumantoj, en la maro de la plen-

dado de unu apenaŭ vivanta, iam vigla kaj riĉa urbeto, mi renkontas miajn karajn esperantistojn.

Unu bela, simpatia fotografisto inteligenta, bonkora.

Unu ankaŭ tre simpatia, entuziasma kudristo, jam patro de du grandaj infanoj, malgraŭ sia juneco, kiu por kongreso en Sliven piede transmarŝis la Balkanon.

Unu ĉarpentisto, eterne nova esperantisto, kies esperantismo konsistas en la bonkora ridetado kaj sincera akompano de mia persono ĉiupaŝe. Al li mankas rimedo por la esprimo de siaj bonaj sentoj, kiujn mi kortuŝite, bone akceptas.

Kiam mi alvenas en Kotel, mi scias, ke mi tuj havos mian esperantan mondon.

Ni tuj ekparolas en esperanto de la unua momento de nia renkonto.

Ni promenadas kune, diskutadas, plendas, gastadas, ŝercadas, ekskursas sur la montojn.

Ni sentas nin feliĉuloj en la maro de la homa malfeliĉo, ĉirkaŭvolvitaĵoj de mistera, hela nebulo de sincera amikeco.

Ni disiĝas kun ĉagreno, flirtigante la poŝtukojn ĝis la plena malapero malantaŭ la kurbo de la vojo, sopirante iaman proksiman revidon.

Jen nia esperantista insuleto en la maro de la vivo. Malgranda, sed kortuŝe simpatia.

Vera esperantista teritorio, laŭ la devizo: nenie kaj ĉie. **Stefan Kadiev**

Lidia Zamenhof

La situacio

La esperantistoj estas informitaj pri starigo de Internacia esperanto-ligo.

Kiel ĉiuj scias, la decido translokigi UEA en Londonon renkontis kontraŭstaron, ĉefe de la svisaj samideanoj. Ili postulis, ke tiu gravega paŝo okazu en maniero tute laŭleĝa, t. e. per laŭstatuta voĉdonado de la delegitoj. Sekve de tiu postulo oni aranĝis voĉdonadon. Sed tiu voĉdonado ne estis ankoraŭ laŭstatuta.

La art. 58 de la statuto diras, ke por ŝanĝi la statuton (translokiĝo ekster Svisujon estas ja gravega ŝanĝo) estas necesa voĉdonado de la delegitoj. Sed iu ajn, eĉ la prezidanto, ne povas laŭ sia propra plaĉo kaj iniciato okazigi la voĉdonadon. Por tio estas necesa decido de la komitato aŭ estraro, aŭ iniciato de kvinono de la delegitoj. Do, por ke la voĉdonado estu laŭleĝa, sufiĉis, ke tiurilata decido de la komitato aŭ estraro, korpoj ne tre grandaj, estu formale akceptita. Tiu formala decido mankis, kaj pro tio oni plendas antaŭ la tribunalo.

La estraro de UEA diradis al ni: „Fidu al ni, ke ni ja volas nur bonon de Esperanto“. Kaj neniu el ni permesis al si tion dubi. Sed same, kiel ni devas esti lojalaj al la ĝisnunaj gvidantoj de UEA, ni ŝuldas lojalecon kaj bonfidon al ĉiuj aliaj membroj de tiu Asocio. Ni devas, do, esti same lojalaj ankaŭ rilate al la svisaj samideanoj, kiujn oni nun emas

prezenti kiel nigrajn ŝafojn. Ni devas kredi, ke ankaŭ ilian agadon diktas nur la zorgo pri la bono de nia afero.

UEA havas statuton. La statuto ne estas kreita por kuŝi en tirkesto. Oni devas ĝin obei. Tiu obeo ligas ne nur simplajn membrojn, sed ankaŭ la gvidantojn de la Asocio. Se en afero tiel grava, kiel foriro el Svisujo, la gvidantoj ne atentis la statuton, oni ne devas miri kaj surpriziĝi, se iuj protestas kontraŭ tiu malzorgo kaj postulas, ke ĉiu litero de la statuto estu respektata.

La gvidantoj povis eble, antaŭ ol aranĝi la voĉdonadon, esperi, ke la membroj ne insistos tro je la formaleco de la procedo. Sed kun la momento, kiam aŭdiĝis la unua protesta voĉo, tiu espero devis fali. Restis nur — agi precize laŭ la statuto.

Kelkaj emas kompreni la agadon de la svisaj samideanoj kiel nuran ĉikanadon. Ili diras: Eĉ se ni konformiĝus al iliaj postuloj, — kian garantion ni havas, ke ili tuj poste ne trovos novajn punktojn por atako kontraŭ ni? Ŝajnas al mi, ke se oni volus senti sin tiurilate tute sekura por la estonteco, oni devus inviti reprezentanton de la protestintoj, ke li partoprenu kaj kontrolu la tutan procedadon. Falsa estus la ideo, ke tio povus malhonoru la Asocion aŭ ties gvidantojn.

En la n-ro 1. de la oficiala bulteno de Internacia esperanto-ligo ni legas, kiel pravigon pri la fondo de la nova Ligo, ke tiu formala laŭstatuta voĉdonado, kiun volas la svisoj, postulus „minimume tri monatojn kaj posttirus la koncernajn altajn elspezojn“. Se ne — proceso, kiu povas daŭri eĉ jaron kaj kosti certe multege.

Ŝajnus nature, ke el la du alternativoj oni prefere elektu la unuan. Sed tio ne okazis. Anstataŭ „malŝpari tri monatojn kaj la koncernajn altajn elspezojn“, oni konsideris, ke estos pli facile fari skismon en la movado.

Laŭ la decido de naŭ (nur naŭ) komitatanoj „La landaj asocioj, respektive komitatanoj, estas petataj tuj ekŝigi el UEA kaj fondi novan asocion“. Kaj se iuj asocioj, komitatanoj aŭ delegitoj ne plenumos tiun peton kaj ne sekvos la gvidantojn sur la novan vojon? Tiam okazos civila milito en Esperantujo, kompareble eble, nur al la Ido-skuo en 1907.

Kaj tion ĉi oni povis eviti, konformigante al la statuto. Por la prezo de nuraj „Tri monatoj kaj la koncernaj altaj elspezoj“ oni povis eviti disrompon kaj konflikton, anataŭ kiuj ni nun staras, kaj kiuj certe daŭros pli longe kaj kostos pli multe. Kial oni ne faris tion? Kiuj motivoj diktis tiun danĝeran elekton? Ĉu eble nura spiteo kontraŭ la protestintoj? Ni legis, ke s-ro Bastien klopodis ĉe la protestintoj, ke ili ĉesigu la ruinigan proceson — kaj ili ne volis. Sed ni ne legis, kiuj estis tiuj nevenkeblaj kaŭzoj, kiuj evidente ĝis tia grado malebligis okazigon de la laŭstatuta voĉdonado, ke oni preferis la disbaton, ol kontentigon de la statutaj postuloj.

Mi akcentas, ke ne temas en ĉi tiu momento, ĉu UEA restu en Ĝenevo aŭ iru en Londonon. Sed temas pri tio, ke gvidantoj de la movado trovis pli facila elvoki skismon kun eble neantaŭvideblaj konsekvencoj, ol subiĝi al la statuto.

La gvidantoj petas, ke ni fidu al ili, kaj ni deziras fidi. Sed ni ne povas fidi blinde. La asocioj, komitatanoj, delegitoj, la reprezentantoj, post kiuj staras la tuta popolo de UEA, ne povas sekvi blinde la alvokon, kiun ili povas kredi nura spito.

La reĝo mortis — vivu la reĝo? Sed la reĝo ne mortis ankoraŭ. Tro frue

estas sonorigi funebrajn sonorilojn por UEA.

La statuto de UEA, sufiĉe strange, ne havas specialan ĉapitron pri dissolvo de la Asocio. Nur en la art. 57 ni legas, ke dissolvi la Asocion povas ĝenerala voĉdonado de ĉiuj aktivaj membroj. Sed okazigi tian voĉdonadon estas ja eĉ pli komplike, ol rearanĝi la regulan voĉdonadon de la delegitoj. Aliflanke, asocioj ordinare dissolviĝas, se ili ne havas plu membrojn. Sed ke UEA restu eĉ sen tri membroj — tio ja ne okazos facile. Se la estraro kaj kelkaj komitatanoj foriros, oni elektos aliajn. Se kelkaj asocioj foriros, restos aliaj, aŭ eble oni denove reformos la statuton, por doni al la esperantistoj pli grandan eblecon aparteni al UEA ekster la landaj asocioj. De la proceso UEA liberiĝos aŭ per formala adaptiĝo al la statuto, aŭ simple, rezignante forlasi Svisujon, kie pro la malaltiĝo de la svisa franko la situacio iĝas pli favora. Malgrandiĝas la valoro de la luopago, impostoj, oficistaj salajroj, kaj eĉ de la ŝuldoj. Se la svisa mono malaltiĝas antaŭ la Pasko, certe la propono pri la translokiĝo trovos malpli da simpatiajuloj.

Gvidantoj de UEA foriras. En la nova asocio ili okupos analogiajn postenojn. Sed kian garantion ili donos al siaj membroj, ke ili respektos la novan asocion kaj ties statuton, se evidente tiel malfacila ili trovis respekti tiun de UEA?

Oni diras al ni, ke temas nur pri nova nomo. „La korpon, la kapon, la koron kaj la animon ni restarigos, nur sub alia nomo, en Britlando“. Restos tamen ĉe la Lemano la laroj kaj penatoj de UEA. Restos en Ĝenevo la tradicio, la materialo, la dokumentaro pri la preskaŭ tridekjara agado de la Asocio. Restos fine en Ĝenevo la biblioteko de UEA, kiun la svisa tribunalo ne permesos forporti.

Okazis en 1907, ke la esperanta popolo resti „armeo sen ĉefoj“, ĉar la ĉefoj transiris en la Ido-tendaron. Kaj la senĉefa armeo venkis la senarmeajn ĉefojn.

Okazis en 1932, ke naskiĝis en Parizo UFE — kaj nelonge ĝi vivis, ĉar venkis la solidareca sento de la esperantistoj kaj la kompreno, ke nur en unueco estas nia forto. Ĉu ni ne esperu, ke ankaŭ nun ni evitos la dramon de la disfalo, ke venkos la sento de unueco?

Двадесет и осмият международен есперантски конгресъ в Виена

Конгресът в Виена завърши своята работа. Хиляди есперантисти от всички краища на земята се завърнаха доволни по своите родни огнища, убедени, че тѣ служат на едно благородно движение, което заслужава старанията и жертвите, които се правят през цѣлата година.

Още на 8 август от всички гари на Виена сж пристигнали есперантисти от близки и далечни страни, дошли в столицата на Австрия, за да манифестират идеята за единъ международен спомагателен езикъ.

Конгресът е заседавал в импониращата по своята величественост сграда на бившия императорски замък, върху мачтата на който се е развѣвал есперантският флагъ.

Тържественото откриване е станало в сжщия ден на 20 часа в присъствието на повече от 1000 делегати и много гости, между които видни лица от австрийското правителство, като министра на търговията г. Фритцъ, добре познатъ между есперантските срѣди като покровител на движението в Австрия и други.

Самъ вицканцлерът на Австрия г. Бааръ Баренфелцъ е открилъ съ подходящи думи конгреса и е приветствувал конгресиститъ от 34 страни, като изтъкналъ, че австрийското правителство разбира високата мисия на есперанто и пожелалъ на конгресиститъ през краткото имъ пребиваване в Австрия много радости и добри спомени, а на конгреса — ползотворна работа.

Конгресът е билъ поздравенъ и от официалните представители на Гърция, Холандия, България, Унгария, Бразилия и Северо-американските съединени щати, а сжщо и от представили на градоветъ: Виена, Будапеща, Карлсбадъ, Мариенсбадъ, Франценсбадъ и Теплицъ.

Заслужава сжщо да се спомене, че, преди откриването на конгреса, германка в национална носия е раздала възпоменателни значки от горните курортни градове.

Следъ това говорили представителитъ на разните национални есперантски съ-

юзи отъ: Англия, Белгия, България, Чехославашко, Дания, Египетъ, Естония, Франция, Унгария, Италия, Япония, Югославия, Нова Зеландия, Полша, Ромъния, Швеция, Турция, Аржентина, Холандия, и Северо-американските съединени щати.

Следъ приветствията на професоръ Камаритъ, който е говорил от името на Чехословашкия есперантски съюзъ, на трибуната се е качилъ съидейникътъ Галеръ, който е говорил от името на Германската есперантска лига в Чехословашко. Топлитъ приветствия на съидейника Галеръ се посрещнали съ бурни и продължителни аплодисменти, особено, когато той е споменалъ, че въпрѣки всички прѣчки които се правят на германските есперантисти, есперанто живѣе и ще продължава да живѣе в тѣхните сърдца.

Съ буря от ржкоплескания сж били сжщо посрещнати внукът на д-ръ Заменхофъ и д-ръ Буйвидъ, които се качили на трибуната съ високо развѣто зелено знаме — първото — от конгреса от Булонъ-сюръ-меръ (1905), а в това време тържествената конгресна зала е екнала от звуцитъ на есперантския химнъ.

Опознавателната вечеръ е станала в залитъ на сжщия замък. Конгресиститъ при най-приятно разположение сж прекарвали до 3 часа сутринта.

Въ недѣля на 9 август сж били извършени богослужения на четири различни религиозни обряди: католически, старокатолически, протестански и еврейски. Най-блестящо е било богослужението на католицитъ, изнесено от виенския архиепископъ Иннитзеръ. Следъ богослуженията генералъ Бастиенъ е положилъ вѣнецъ върху паметника на незнайния войнъ от името на всички есперантисти, като е пожелалъ да не ставатъ никога вече войни между народитъ.

Следъ обѣдъ радио Виена е предало по-важните части от откриването на конгреса, снети на грамофонни плочи, следъ което конгресиститъ сж посетили двореца Шьонбрунъ, от които разкош-

Pli alten ni celu!

Nur tre malmultaj landoj povas fieri pri proporcio tiom granda nombro da esperantistoj kiel Bulgarujo. Ĝi estas tre ĝojiga fakto, sed nur unuflanka. La organizitaj esperantistoj nur vegetas aŭ estas subtenataj per malnaturaj rimedoj. Ŝajnas paradokse, sed estas fakto. Jam de unuaj tagoj de mia alveno en Bulgarujo mi multe interesiĝis pri tiu ĉi fenomeno. Mi parolis kun multaj personoj, societgvidantoj, kronikaj izoluloj kaj eksagantoj, kaj dum mia lasta vojaĝado mi havis okazon renkontiĝi kun multaj provincaj samideanoj, grupoj, eminentuloj kaj izoluloj. La simptomoj ĉie estas la samaj: grupoj apenaŭ vegetas, sed izoluloj svarmas.

Ekzamenante la kaŭzojn de disorganiziĝo, mi povis konstati kelkajn neajn faktorojn, nediagnostitajn de la gvidantoj de la movado. La plej granda parto plendis pri la tendenceco de la samideanoj kaj pri oficialaj malhelpoj, sed tiu ne estas radikaj baroj laŭ mia opinio. La kaŭzo kaŝiĝas tute en alia flanko: en la esperantistaro mem.

En multaj kazoj bulgaro estas tro ambicia, malema al socia kunlaborado, due la diableto de kritikemeco kaj spiteco ne estas bridita. Veraj laborantoj tre tre malmultaj, sed kritikantoj tro tro multaj. Konsiderante tiun ĉi psikologian econ oni po-

vās kompreni malfacilecon de kunlaborado.

Mi ĉiam diras, ke oni devas naskiĝi esperantisto: oni ne povas fari esperantiston. Persono devas posedi kulturan nivelon, bezonatan por esperantisto: li devas esti universala kaj demokrata estaĵo, sentanta bezonon de internaciaj rilatoj. Ekzistas ja miloj da esperantistoj, kiuj ne scias Esperanton kaj ekzistas miloj da esperante parolantaj neesperantistoj.

Esperanto estas kulturfaktoro, kaj kiel tia ĝi devas esti traktata: ĝi ne estas moda varo, ĝi ne estas mallongigita vojo al ĉielo laŭ iu religia sistemo, ĝi ne estas nura, senviva ilo por ĉiaspeca uzado, sed ĝi estas tia konscia ilo, kiu — bone servante apartan celon — celas al interkompreniĝo, amikiĝo — do paco kaj amo. Ni ne faru ĝin dumpinga aĵo per troa reklamo, aŭ tute sensenca, senviva ilo, aŭ religie naiva paradizo de iluzio por ĉie, ĉiam kaj ĉiala tro fervoreco.

La trafaj elmontroj de ĝia praktika uzebleco en civilizacia, kultura aŭ spirita servo neniam restos senfruktaj en la vicoj de veraj estontaj samideanoj. Kaj, krom tio, propagandante pacon, amon kaj kunagadon, ni ne forgesu ankaŭ ĝin montri praktike.

En la kunvenoj ni devas montri demokratian spiriton, ne tian supozitan, kiam ĉiu deziras, ke la domoj estu konstruitaj laŭ iliaj projektoj, sed tiun veran, kiam ĉiu ĝojos meti sian brikon apud tiu de aliaj por konstruado de komuna domo. Bonvolu proponi nur tion, kion vi mem povas fari kaj konsentas fari. Kritiku nur tiam, kiam vi mem povas pli bone fari kaj estas preta fari. Forgesu vian personan ambicion: ĉiu havas saman rajton, kaj se vi deziras, ke via opinio estu respektata, respektu antaŭe alies opinion. Neniam forgesu, ke en la kunveno vi estas ne aparta individuo, sed nur kunlaboranto — ĉelo de la komuna korpo. Kiel esperantisto ĉiam fieru, ke vi kuniĝas kun aliaj samideanoj sur la bazo de egaleco, nur kiel homo, la plej supera valoro de via estaĵo. Forgesu, ke vi estas isto de iu sistemo, estu nur homo, vera homo, kiu vidas en aliu la saman nur homon sen lia ismeco. Vi povas esti, kaj ĉiuj estas,

ни зали и очарователен паркъ тѣ сж останали много възхитени.

Сжщата вечеръ театръ Раймундъ е представилъ оперетата „Бѣлото конче“ на есперанто. Живата и художествена игра на артиститѣ е била посрещната съ възторжени одобрения отъ многобройната есперантистка публика, която е останала възхитена отъ великолепния преводъ на тази оперета, безъ да е загубила отъ свежестъта на оригинала. Такава международна публика оперетата „Бѣлото конче“ още не е имала.

Цѣлата конгресна седмица е била богата съ събрания, реферати, забави, концерти, театрални представления и др. Може да се каже, че конгресътъ въ Виена е билъ единъ отъ добре изнесенитѣ.

ekster la esperantistoj io ajn, sed estas al vi kaj al ĉiuj aliaj ebleco forgesi por kelka tempo tiun kaj esti nure pura homo. Nur en tia kunveno povas naskiĝi, prosperi kaj venki Esperanto, kaj nur tiaj esperantistoj estas veraj kulturaj pioniroj de venonta epoko — epoko de homeco.

Krom la sintenado de la partoprenantoj, ankaŭ estas urĝa bezono reorganizi la kunvenojn: la ĉiama prezidanto devas prepari tagordon, proponi aŭ elektigi kunvenprezidanton, kompletigi aŭ forigi ion en tagordo.

La varieco de opinioj ĉiam okazis kaj okazos, sed la kunveno ne povas esti eluzata por ekzercoj de ruzaj oracioj aŭ lertaj spitecoj. Ĝi devas esti takta. Se ekzistas diverseco de opinioj, oni lasu ambaŭ flankojn referi kaj baloti. La prezidanto devas gardi, ke la paroloj temu pri la celo. Flankaj paroloj aŭ replikoj ne devas havi lokon. La oratoraj kaj replikaj amuziĝoj povas okazi en la dua parto de la tagordo, nomata „Proponoj kaj demandoj“, kiu jam ne plu minacas forpreni tempon

destinitan por laborkunsidoj. Sed ankaŭ en tiu ĉi parto prezidanto devas esti tre severa, ke la paroloj kaj replikoj ne temu pri la personoj, sed nur pri ideoj aŭ manieroj. Tiu, kiu avertita duan fojon, malatentas la prezidanton, perdas rajton paroli pri la sama afero.

La memdisciplino estas signo de kultura homo.

Mi kredas, ke se tiuj ĉi du grandaj mankoj estos izolitaj, la esperantista rondo fariĝos plej plezura kaj agrabla fajrejo por la kultivado de la homaro, kaj neniu el la samideanoj devos esti minacata per punoj pro nevizitado de la kunveno, ĉar la partoprenado en la organizaĵo fariĝos malofte renkontata plezuro kaj vera festo.

La suprediritan senton mi ĉiam sentadis vizitante kunvenojn en la diversaj eŭropaj landoj, kaj ĝi estas sentata ankaŭ inter la bulgaraj samideanoj en neoficialaj renkontiĝoj. Do ĝi estas kultivebla ankaŭ en Bulgarujo. Pli da solidareco, miaj bulgaraj amikoj!

A. Poška

Всѣки есперантистѣ трѣбва да стане членѣ на Бѣлгарския есперантски сѣюзѣ, да получава сѣюзния органѣ »Bulgara esperantisto« и да сѣдействува съ всички сили и срдства за успѣха на общото дѣло!

Сѣдейнико, изпълни своя есперантски дѣлгѣ!

Peresperanta infanbilda ekspozicio

Dum la fino de majo j. k. en Kneĵa ni havis apartan plezuron — ĝui interesan bildan ekspozicion.

Ĝi estis organizita de nia samideano s-ro Doĉo Dimitrov, liberprofesiulo el Oreĥovo. Helpita de sia samurba inspektoro s-ro Ĵelez Jankov, li kolektis el niaj fundamentaj lernejoj bildojn, kiujn interŝanĝis kun tiaj el aliaj landoj. Tiel li kolektis proksimume 4,000 bildojn el 35 landoj. Li elektis la plej karakterizajn kaj simple, sed bonguste enkadrigis ilin. En la salono de nia reala lernejo li majstre aranĝis proksimume 400 bildojn el 11 landoj.

Unue mi vidis nur bildojn, tre diversajn, sed baldaŭ mi estis enokuligita de io ĝenerala, kiu karakterizas la naturon, la produktadon kaj la karakteron de ĉiu lando.

Svedio montriĝis per la neĝa homo,

per la skioj kiel lando de la neĝo.

Francio karakteriziĝis per la bunta papilio kaj per la floranta salikbranceto kaj burĝoninta avelo kiel lando de la arto.

Nia lando frapis per siaj floroj (rozoj ekzemple) fruktoj, birdoj, brodaĵoj. Do ĝi estas ankoraŭ proksimnatura „rozlando“.

Ĉekoslovakio, kontraŭe, per siaj porcelanaĵoj, naztukoj, maŝinoj k. a. manifestiĝis kiel lando de industrio.

Holando karakteriziĝis per siaj velŝipoj, ventmuelejoj kaj tulipoj kiel lando de la maro kaj de la florkampoj.

Latvio per siaj arbotrunkoj, arbŝeloj kaj folioj aspektigis sin kiel natura arbarlando.

Germanio per siaj konstruaĵoj, salonaj mebloj — kiel lando de la kultura hejmeco.

Hungario montris siajn buntajn brodaĵojn, punktojn, surskribojn — lando de la ornamaĵoj.

Hispanio frapis la okulojn per siaj ruinaĵoj, kasteloj, serenadoj, sed ankaŭ per siaj fruktoj — do ĝi karakteriziĝas kiel kavalira lando de malnova kulturo kaj abundaj fruktoj.

Japanio (Nipponlando) impresas per siaj belaj pejzaĵoj, lignaj dometoj kaj maro — do bela insullando.

Belgio nur estis iom strange reprezentita. Ĝi abundis per majstraj fabelbildoj. Oni dirus, ke ĝi estas lando de la fabeloj. Sed laŭ mia scio, ĝi estas lando de la realaĵoj. Tiu unuflankeco venas de la cirkonstanco, ke el ĝi nia organizanto ricevis bildojn nur de unu liceo, kie verŝajne oni akcentis tiajn pentrajn temojn. Sed feliĉe, Belgio estis nur escepto de la regulo.

Do ĉu ne estas mirinde, ke infanoj kaj gejunuloj povas prezenti tiom sponte, ĝuste kaj bele siajn patriojn? Kiom instrua, ĝua kaj arta leciono de geografio, kulturo kaj historio! Ĉar estas vere majstraj bildoj: la menciitaj buntaj papilioj kaj branĉetoj de floranta saliko kaj burĝonanta avelo de francaj 14 jaraj kna-

boj; „La forĝejo de Vulkano“ de la talenta 11 jara hispaneto Bonsorna; „Infanoj ludas“ de 9 jara nipponeto. Strange ankaŭ estas, ke eĉ plej vulgaraj objektoj pentritaj, povas liveri al ni estetikan ĝuon — ekzemple simpla gazeto (Hungario).

La organizanto, klarigante al la publiko la manieron kolekti la bildojn, sponte propagandas esperanton. Li estas tre antaŭinta samideano kaj sperta kursgvidanto.

La ekspozicio meritas esti vidata en ĉiuj urboj kaj vilaĝoj de la lando. Preĉipe tie, kie la grundo ne estas sufiĉe preparita kaj oni timas plugi la unuan sulkon, s-ro Dimitrov povas fari tion. Do interesatoj bonvolu skribi rekte al li.

Tiu ekspozicio estus verŝajne interesa ankaŭ por aliaj landoj. Tiel multaj el ili povas vidi sin en bildoj. Mi esperas, ke s-ro Dimitrov dediĉus sin al internacia apostolado.

La ekspozicia takso estis tiom malgranda (1—3 levoj), ke mi miras, kiel la organizanto povas ekzistadi.

Do, dankante lin kaj liajn helpantojn pro la granda plezuro, kiun li liveris al nia vilaĝo, mi volonte rekomendas lin al ĉiuj niaj kaj fremdaj samideanoj.

Agro

Inaŭguro de l' „albatra“ klubejo en Varna

Estis dimanĉo, je la 16-a de aŭgusto j. k., kiam okazis la inaŭguro de unu modesta esperantista kunvenejo. La kultura esper. societo „Albatro“ en Varna festis nun sian venkon sur la vojo de la movado.

Lui per helpo gratifikacia kaj posedi por dispono ĉiama unu konstantan rezidejon estas grava akiro por la societo. La pacaj batalantoj sincere ĝojis — iliajn korojn plenigis granda espero por la sukcesoj en la paca batalado.

Post la inaŭgura meso, gratulis nian ĝisnunan madestan sukceson kaj bondeziris al ni pluajn sukcesojn pastro P. Ikonov, s-roj la delegitoj de diversaj organizaĵoj: — „Varnenski korenjak“, rezervaj oficiroj, s-ro Belĉo Oktomvrijski je la nomo de la Bulgara e-to-asocio k. a. Per flamaj vortoj gratulis nin la germana samideano s-ro Rudolf Meyer el Har-

burg, kiu esprimis sian grandan ĝojon havi la feliĉan okazon ĉeesti gravan esper. feston. Li finis per la vortoj: „Nun ni, la germanoj, bedaŭrinde, ne povas labori por nia kara ideo, ni tamen restas fidelaj al la movado. Duobligu viajn fortojn por venki la barojn kaj estu certaj, ke ni atingos la revatan celon“ . . . La parolado de nia germana samideano estis tradukita bulgare de s-ro Julzari kaj faris grandan impreson al la ĉeestantoj.

Telegrafe kaj letere gratulis nian



La ĉeestintoj post la inaŭguro de esperanto klubo en Varna

Известия на централния комитетъ

Да създадемъ фондъ за пропаганда!

За да се проведе системна пропаганда, трѣбватъ срѣдства.

Централниятъ комитетъ при обсъждането на всѣка полезна инициатива се натѣква винаги на най-важната прѣчка: нѣма пари въ съюзната каса.

Много нѣщо може да се направи, много пожелания на конгреситѣ могатъ да се осъществятъ, ако ръководното тѣло на съюза разполага съ единъ фондъ, който да му развърже рѣцетѣ и да му даде куража и спокойствието да обсъжда правилно предложенитѣ инициативи.

Единъ фондъ отъ 50,000 лева

е нѣщо осъществимо и необходимо за движението.

Хиляда български есперантисти могатъ да отдѣлятъ и пратятъ по 50 лева за целта.

Петдесетъ лева не сж голѣма сума и за най-бедния. Тѣ нѣма да катурнатъ неговия бюджетъ. Дори безработниятъ може да намѣри и изпрати тая сума;

„Albatro“-n ankaŭ la samideanoj el Sevlievo, la turistoj en Varna „Rodni balkani“, s-ro Ilia Silvestriev el Ŝumen, s-ro Ksenofon Jankov el Sofia — eksprezidanto de „Albatro“, f-ino Mara Tihinova el Tirnovo k. a.

Akceptis la gratulojn la vicprezidanto de „Albatro“ s-ro Georgi Hr. Dimov, kiu per konvenaj vortoj respondis al ĉiu gratulinto.

Plej kortuŝanta estis la gratulo de s-ro Hristo Mirski, la filo de la unua nia urba esper. pioniro s-ro Krâsto Mirski, en kies honoro ĉiuj ekstaris estime. Ĉu ne estis ja tio tre alta festa ĝojo?

Posttagmeze okazis bonevizitita esperanto-konferenco. Partoprenis gesamideanoj el Varna, Ŝumen, Ruse, Vidin, Petrtĉ, Sofia, Pleven, Tirnovo k. a. Referis s-ro B. Oktomvrijski. Vespere — intima festeno en margardena „Graniĉen kât“.

Zora Mlad. Hans.

ако гладува, отъ тая жертва гладътъ му нѣма да се увеличи.

Но ако беднитѣ се отзоватъ и пратятъ 50 лева, заможнитѣ не ще се задоволятъ да пратятъ само тоя минимумъ!

Хайде, съидейници, напрегнете се! Направете жертвата! Откъснете отъ залѣка си, съ съзнанието, че давате подкрепа на дѣлото, въ единъ решителенъ моментъ.

За да успѣемъ, никой да не изчаква да бжде последенъ. Въ такива начина всѣкой трѣбва да се стреми да бжде пръвъ.

Още до края на ноемврий желаниятъ фондъ трѣбва да се създаде!

— Този брой се изпраща на всички познати съидейници и миналогодишни абонати. Умоляватъ се съидейниците да си платятъ абонамента отъ 20 лева, или върнатъ списанието веднага въ редакцията.

Сумитѣ да се превеждатъ чрезъ пощенска чекова смѣтка на съюза № 1133. Тамъ където нѣма т. п. станция, може да ни се изпращатъ пощенски марки.

— Окръжно № 5 се изпрати на 1200 съидейници. Ако всѣки бѣше изпратилъ само по 10 лева, щѣхме до сега да изплатимъ нашия домъ.

— Презъ м. ноемврий съидейникътъ Ант. Пашкевичиусъ, антропологъ отъ Литва — гостъ на Българския есперантски съюзъ — ще посети следнитѣ пунктове, където ще изнесе цикълъ сказки съ свѣтливи картини, а именно: Перникъ, Радомиръ, Кюстендилъ, Дупница, Г. Джумая, Самоковъ, Долна баня, Пазарджикъ, Пловдивъ, Асеновградъ, Хасково, Кърджали. Н.-Загора, Казанлъкъ, Сливенъ, Ямболъ, Айтосъ, Бургасъ, Варна, Шуменъ, Попово, Г.-Орѣховица, Търново, Габрово, Севлиево, Троянъ, Ловечъ, Свищовъ, Русе, Бѣла, Плѣвенъ, Червенъ брѣгъ, Кнежа, Орѣхово, Ломъ, Видинъ и Враца.

Умоляватъ се съидейниците да му даватъ нужното съдействие.

NIA VIVO

Asenovgrad. Societo »Signo de l' espero« renovigis sian agadon dank' al la iniciato de nia fervora samideano David Sasonov. Je la 3. de oktobro okazis ĝenerala kunveno kaj oni elektis la jenan komitaton: prezidanto Vasil Dârvarov, sekretario — Krâstju Georgiev kaj kasisto — Jordan Točev.

Baldaŭ komenciĝos kurso por komecantoj.

v. Boboŝevo, Dupnica reg. La intereso pri esperanto en nia vilaĝo estas granda kaj plifortiganta. Multaj junuloj entuziasme manifestas sian simpatian. Ofte nian vilaĝon travojaĝas eksterlandanoj parolantaj en esperanto. La lasta fakto ankoraŭ pli entuziasmigas ilin. Sendepende de tio, tamen, la interna ideo de esperanto ne malpli altigas ilin. Kaj ili fervore ellernas esperanton, ĝis kiom permesas al ili la kondiĉoj.

Pazarĝik. La loka societo »Radio« en la ĵarkunveno je la 11-an de septembro elektis novan estraron: prezidanto — Ivan K. Vasilev, sekretario — Atanas Furnaĝiev, kasisto — Vasil Lazarov. Kontrola komitato: Ĥristo Kokotanov, Ĵak M. Behar kaj Petr K. Vasilev.

Sevlievo. Kurso por geurbanoj vizitata de 30 personoj. La kurson gvidis s-anoj Dim. Karagjozov kaj Bebel Minkov. Granda entuziasmo inter samideanoj.

Sofia. Sofiaj pacaj batalantoj komencis novan jaron de la societo per la elektado de la nova estraro. La nuna „kabineto“ konsistas el nia tradicia prezidanto s-ano St. Gančev, vicprez. nia energia s-ano St. Jončev, sekretario nia agiteca verdulo s-ano Boris Golemanov, kasisto nia dolĉa ŝalmisto s-ano Ivan Iliev, bibliotekisto nia serioza okulvitrulo s-ano Geo Hârŝev kaj la rolon de nia dommastrineto ludos nia ĉiam verda kaj ĉarma fraŭlino Nad. Petroviĉ. La reviziuloj estas s-anoj Iv. Sarafov, P. Mitkov kaj Ml. Nikolov.

La nova estraro decidis agi kaj organizi.

— La 20 de septembro niaj samideanoj vizitis la tombon de nia bonfartino S. Naĵarova kaj fotografiĝis tie, surmetante florojn.

Sofiaj esperantistoj antaŭ la tombo de nia kara mortintino S. Nojarova okaze 3-a datreveno de ŝia morto.

— Krome la sofiaj esperantistoj treege bedaŭras forvojaĝon de du siaj plej agemaj anoj, kiuj instruistiĝis: s-ro L. Marikin en Pleven kaj s-ro S. Hesapčiev en Sevlievo.

— En la plano de la agado societo decidis aranĝi tutan ciklon da prelegoj ĉefe pri la interna ideo kaj pli bona kompreno de esperantismo. Same estis antaŭviditaj kaj verŝajne kiam vi legos tiujn ĉi strofojn jam efektivitaj esperanto-kursoj en ĉiuj popollegejoj en Sofia.

— S-ro d-ro Z. Zahariev havis priesperantan paroladon en legejo „Ĥr. Botev“. Same tie prelegis nia litova samideano pri l'indujo kaj Himalajo.

— Dumtempe sofianoj akiris dinamikan samideanon de Varna s-ron G. Dimov, kiu per sia temperamenta bruo por esperanto multe plivigligis nin kaj aranĝis prelegon kaj provlecionon pri Andreo Ĉe metodo.

— Lastatempe la societo preparas la verdan semajnon. Speciala kultura komisiono prizorgas esperantan propagandfolion en kiu partoprenas konataj bulgaraj filologoj, verkistoj, politikistoj k. a.

Dum la verda semajno la societo intencas malfermi kursojn ĉe ĉiuj legejoj en Sofia. La verdan semajnon mem oni finos per granda publika kunveno en salonego.

— La societa murgazeto regule aperas kun interesinda enhavo. En la lasta kunveno oni decidis plivigligi la enlandan (intersocietan) kaj eksterlandan korespondadon. Tuj la decido estis efektivigita.

— 29-an de oktobro s-ano B. Oktomvriski parolis antaŭ mikrofono de radio Sofia je temo: »La problemo de la internacia lingvo«.

Ŝumen. Je la 23. de julio okazis ĵarkunveno. La delegitoj raportis pri la kon-



greso en Tírnovo. Post tio oni elektis novan estraron: prezidanto — Ilíja Silvestriev, vicprezidanto — d-ro Hjúsein Topuzov, sekretari-kasisto — Stalian Danískov kaj bibliotekisto — Todor Kalícev. Kontrola komitato: Elena Koeva, Janko Jankov kaj Ilíja Todorov.

Varna. La 24-an de julio en la Trakia domo s-ro Georgí Ĥr. Dímov raportis detale pri la esperanto-kongreso en Tírnovo.

— La 7-an de aŭgusto s-ro A. Poška — litova antropologo, paroladis en la esperanto-klubejo antaŭ plenplena salono pri »Hindujo — la lando de mistiko«. La parolado estis lerte tradukita bulgare de s-ro Sim. Hesapčiev. La lokaj ĵurnaloj »Ĉerno more«, »Varnenska poŝta« kaj »Varnenski novini« aperigis tiu-okaze artikolojn.

— La 9-an de aŭg. ekskurso boate al »Ĉajka« — al la kontraŭa bordo de la lago. Krom la multaj varnaj gesamideanoj, partoprenis la ekskurson la gastoj: s-ro A. Poška, s-ro Hesapčiev kaj s-ro Dímitr Stojanov, nia samideano el Petriĉ. Oni amuzis, ludis, dancis, fotografis kaj vespere piedrevenis tre kontentaj.

La saman tagon okazis oficiala elekto de plaĝregino. Por ĝojo de la esperantistaro en Varna la elektita plaĝregino estas fino Perŝinka Zubkova, nia samideanino el Brno, Ĉeĥoslovakio.

— La 15-an de aŭg. vizitis Varna'n la germana samideano s-ro Rudolf Meyer el Harburg — Germanio. La saman nokton alvenis per la rapida vagonaro la sekretario de Bulgara esp. asocio s-ro Belčo Oktomvrijski — la speciala delegito de centra komitato, okaze la esperanto-festo. Ambaŭ samideanoj estis renkontitaj ĉe la stacidomo de multaj gesamideanoj. La gastoj estis prezentitaj al la samideanoj de la esperanto-rondeto ĉe la stacidomo Varna.

— La 16-an de aŭg. okazis solena inaŭguro de la esperanto-klubejo. Predikis pastro P. Ikonov. Post la farita meso li diris tre belajn salutvortojn kaj montris la komunan celon de la eklezio kaj la esperantistoj. Okaze la inaŭguro la albatrano esperanto-poeto s-ro Dímitr Zlatarski, konata per la pseŭdonimo Mití, recitis dediĉitan al la societo poeziaĵon »Albatro« Oni tondre aplaudis la poeton. Oni akceptis unuanime la poeziaĵon kiel marŝ-

kanton de »Albatro«! Sekvis gratuloj de multaj organizaĵoj kaj asocioj. Estis ricevitaj saluttelegramoj kaj leteroj.

Posttagmeze okazis esperanto-konferenco, vizitita de multaj gesamideanoj el diversaj urboj. Prelegis sekretario de BEA s-ro Oktomvrijski.

— La 21-an de aŭg. gastis s-ro d-ro M. Zamenhof, kiu paroladis en la esperanto-klubejo pri la esperanto-movado en Polujo. Post li, nia gasto s-ro W. Manders, ĉefredaktoro de la monata revuo »Amikeco« el Venlo, Nederlando, parolis pri la esperanto-movado en Nederlando. Ambaŭ paroladoj estis tradukitaj bulgaringve de nia samideano Julzari.

Post la interesplenaj paroladoj sekvis komuna fotografado.

— La 22-an de aŭg. kelkaj gesamideanoj, kun la societa standardo, akompanis ĝis la stacidomo s-ron W. Manders, kiu forveturis forlasante nian landon kun plej belaj rememoroj. La saman tagon alvenis kaj forveturis per vaporŝipo la franca samideano s-ro A. Pellet — ĥirurga dentisto ĉe la medicina fakultato de Lyon — Francio.

Flirtigante la standardon, oni faris tre efikan propagandon antaŭ la bulgara kaj fremda publiko. Dank' al tio la verda kompanio plimultiĝis. Subite ĉe ni alvenis kaj alparolis esperante s-ro inĝeniero Hans König, samideano el Wien — Aŭstrio.

La 29-an de aŭg. alvenis vaporŝipe de Burgas esperanto-familio s-ro Ivan K. Vasilev — la prezidanto de societo en Pazarĝik kun sia edzino. Ilin renkontis ĉe la haveno s-ino Maria Saralieva kaj s-ro Georgí Ĥr. Dímov. La standardo denove allogis la atenton de la publiko.

La 4-an de sept. ĉeestis la virinan rondon esperantistan s-ro Teufelsbrucker Alexander kun sia tre simpatia fianĉino.

Post la salutvortoj li priskribis la esperanto-movadon kaj speciale la virinan movadon en Aŭstrio. La saman vesperon ili forveturis al Linz.

— La 6-an de sept. alvenis la ĉeĥa samideano s-ro Richard Schäfer el Píhl Ĉeĥoslovakio.

— La 9-an de sept. s-ro Schäfer paroladis en la klubejo pri la esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio kaj speciale pri la »verda stacio-radio Brno«.

— Ĉiudimanĉe kaj festotage »Al-

batro» ekskursas al la belaj ĉirkaŭaĵoj de Varna. Ĉiulunde okazas prelegoj pri lingvaj demandoj. Ĝis nun referis: s-ro Violin Oljanov pri la akuzativo en esperanto. Pri la sama temo prelegis ankaŭ s-ro Dímítr Zlatarskí. S-ro Julzari parolis pri la infinitivo en esperanto.

— La 14-an de sept. s-ro Georgi Ĥr. Dimov paroladis pri la metodo de Andreo Ĉe — ĝiaj bonaj kaj malbonaj flankoj.

— Ĉiunmerkrede okazas la regulaj kunvenoj kun tre interesa »viva gazeto«. Oni baldaŭ intencas eldoni ankaŭ »muran gazeton«; kiel aldonon al la »viva gazeto«.

— Ĉiuvendrede kunsidas »virina rondo esperantista«, kiu havas tute specialan karakteron. Malgraŭ tio, ĝin vizitadas ankaŭ multaj sinjoroj.

— La 16-an de sept. okazis ĵarkunveno. Partoprenis preskaŭ ĉiuj gesamideanoj. Oni tutanime aprobis la agadon de la pasintjara komitato kaj elektis novan komitaton: prezidanto — Ĥristo Petrov, vicprezid. — Georgi Ĥr. Dimov, sekretario — Vitali Julzari, kasisto — Ĥristo Cvetkov, bibliotekisto — Maria Saralíeva. Kontrola komisiono: Georgi Nikolov, Veska Skolufanova kaj Jurdanka Slavova.

V. Zlatna livada. Ĉirpana reg. Aperis nova verda flameto. Oni fondis novan societon, dank' al la iniciato de nia fervora samideano Petr Ĉemširov. Elektita komitato: prezidanto — Ivan D. Ivanov, vicprezidanto — Marĉo K. Marínov, sekretari-kasisto — Petr Ĉemširov kaj bibliotekisto — Mitju N. Stalev. Kontrola komitato: Petko P. Petrov, Tanĉo H. Tanev kaj Gospodín R. Ĉavdarov.

GESAMIDEANOJ, FOTISTOJ KAJ FOTOAMATOROJ! — Bonvolu tuj peti poŝtkarte la fabrikejojn, kies materialojn vi uzas, ke ili uzu en siaj klariglistoj ankaŭ esperanton. Estas dezirinde, ke la uzantoj de diversaj petrolprembuliloj („primusoj“) k. a. faru similon. Tiamaniere ni helpas la disvastigon de esperanto kaj komprenigos al la gesamideanaro la instrukciojn, kiuj nun estas multlingvaj, sed tamen por ni nekompreneblaj! Se ni ne preterlasos la okazojn uzi la lingvon en ĉiuj regionoj de la vivo, ni baldaŭ ĝuos ĝian ĉiuhoman scion kaj aplikon. B. M.

DANKESPRIMO.

Erinka kaj Ĥristo Dimovi

la gepatroj de nia samideano Georgi Ĥr. Dimov — del. de UEA en Varna, esprimas sian koran dankon al s-ro d-ro Mieczyslaw Zamenhof — la nevo de nia kara majstro el Warszawa, kiu dum sia tre mallonga restado en Varna malavare kaj sindone oferis sian tutan tempon kaj sukcesis savi la vivon de ilia grave malsana filo Totko.

Dank' al la klopodoj de nia kara samideano d-ro Zamenhof nun ilia amata Totko ĝuas bonegan sanon.

Varna, aŭgusto 1936.

DONACITAJ SUMOJ POR NIA ESPERANTO-DOMO:

| | Levoj |
|---------------------------------------|-------|
| 96. R. Schäfer Pihl — Ĉeĥoslovakio | 50 |
| 97. Stefan Minkov — Sofia | 100 |
| 98. Esp.-societo „Vekiĝo“ — Ŝumen | 1000 |
| 99. Asen Vasev — Kjustendil | 100 |
| 100. Nedelĉo Atanasov — Burgas | 10 |
| 101. Ĥristo Donĉev — v. Golemo selo | 20 |
| 102. Ganka Dojnova — Vraca | 20 |
| 103. Esperantina R. Triĉkova „ | 20 |
| 104. Boris Angelkov — v. Buĉin prohod | 50 |
| 105. Ĥristo T. Simeonov — Sevlievo | 20 |
| 106. Boris Milĉev — v. Kneĵa | 20 |
| 107. Panajot Botev — v. Vârbovka | 5 |
| 108. Kina Dermengieva — v. Kilifarevo | 10 |
| 109. R. Kacarov — v. Ŝipka | 20 |
| 110. X. Y. Z. | 30 |
| 111. Janko Jankov — Ŝumen | 30 |
| 112. Georgi Donĉev — Tirnovo | 20 |
| 113. Ĥristo G. Kovaĉev — v. Batoŝevo | 20 |
| 114. Ivanka Derviŝeva — Tirnovo | 20 |
| 115. D-ro Zah. Paskalev — Jambol | 200 |
| 116. At. Kurtev | 200 |
| 117. Jordan G. Mitev | 50 |
| 118. Penko Petrov | 50 |

De la pasinta jaro 10,910

Entute ĝis 31. X. 1936 12,975

Estas multaj samideanoj, kiuj ĝis nun ankoraŭ ne sendis sian helpmonon. Samideanoj, ni denove alvokas vin! Ne forgesu viajn esperantajn devon kaj solidarecon! Tuj sendi viajn brikojn!

F-ino FORTUNE L. DANON
kaj

s-ano BENCION H. DANON
el Pazarĝik
fianĉiĝis

La redakcio kore gratulas la feliĉan paron.

GEEDZIĜO.

La 30-an de aŭgusto en Ĉepelare edziniĝis

f-ino VERKA ST. MAREVA,
filino de nia malnova kaj fervora samideano Stojan D. Marev, kun
s-ro VASIL V. ŜOKOV.

Sincerajn gratulojn al la juna geedza paro

NIAJ MORTINTOJ

La frapo de la senkompata morto forrabis el niaj vicoj nian batalanton sur la verda kamparo s-anon

STOJO JL. LJONDEV

(naskita en Macedonio, vil. Dutlia, Sersko)

Ripozu pace, amiko, ni vivantoj sur nin prenas vian taskon.

La 16-an de aŭgusto j. k. en la Rila monaĥejo mortis nia samideano

Arĥimandrito

Zaharij Atanasov

Li estis naskita la 20-an de julio 1874 j. en Dupnica. Siajn studojn faris en la Eklezia seminario en Samokov. Unu el la kleraj monaĥoj, li estis tre sindona esperantisto kaj kun frata amo renkontis la samideanojn, kiuj vizitis la historie faman monaĥejon de Rila.

DEZIRAS KORESPONDI:

S-ro Dimitr Iliev, str. Drin, 4
Plovdiv — Bulgario.

S-ro Ivan Konstantinov ŝanĝis sian nomon jene: Ivan K. Vasilev, str. Batak, 26 — Pazarĝik.

RICEVITAJ GAZETOJ:

Аптекарска защита — Братство — Белга esperantisto — Bulteno de Aŭstria esperantista federacio — Bulteno de Internacia sciencia asocio esperantista — Bulteno de Marista ligo esperantista — Bulteno de tutmonda asocio kolektanta — Contact — Cosmoglot — Cronache italiane del turismo — Ĉeĥoslovaka radio-bulteno — Ĉielarka standardo — Ĉinio hurlas — Dansk Esperanto — Blad — Esperanta radia bulteno — Esperantobladet — Esperanto internacia — Esperanto triumfonta — Franca esperantisto — Heroldo de esperanto — Hispana esperanto gazato — Informbulteno de C.N.T. kaj F.A.I. — Informilo de Germana esperanto-ligo en Ĉeĥoslovakio — Informoj de Esperanto-asocio de Estonio — Internacia medicina revuo — Internacia pedagogia revuo — Internacia S.O.S. bulteno — Jugoslovenska poŝta telegraf i telefon — Жарь — La interligilo de l' P.T.T. — La juna vivo — La kosmo — La militrezistanto — La mondo, kaj aliaj.

Есперантска книжница

Изпратете сумата въ пощ. или гербови марки, за да получите веднага книгитѣ: лв.

Пъленъ учебникъ по Есперанто съ граматика, упражнения, читанка и 2 речника (еспер.-бълг. и бълг.-еспер.) отъ д-ръ Хитровъ .. 15
Міа а міко, сборникъ четива . 8
Международ. стенограф. система „А о р о“, безъ надебелявания, изучаема въ 2 часа, пъленъ учебникъ 6
Толстој: Dio unu por ĉiuj, rakonto . 5
Kuprin: Laŭroj, rakonto 3
Ĵ. London: Ĥinago, rakonto 10
Ĝarŝin: Signalo, rakonto 8
Ĥitrov: Ĝuto, poŝt ĝuto, versaĵoj . . 12
5 есперантски пощенски карти . . 6

Адресъ: Ст. М. Хитровъ — В. Търново